

## Kio okazos hodiaŭ?

★ **11 atm: Amri WANDEL prelegos**  
Post la klas-paŭzo, iru al AP&M 4301.

★ **2 ptm: TAKE vokos nin**  
Espereble la partoprenantoj de TAKE vokos nin por skajpumi. Ni atendos ilin en la komuna salono.

★ **3 ptm: Vido prezentos Duan Vivon**  
Dua vivo estas virtuala mondo en la Interreto, kie dekmiloj da homoj renkontiĝas ĉiutage. Ni ekrigardos ĝin en la komuna salono.

★ **7 ptm: diplomceremonio**  
Renkontiĝu denove in AP&M 4301. Ni deklamos poezion kun Esther, Meja montros fotojn el la lastaj tri semajnoj, kaj la instruistoj disdonos viajn diplomojn!

## Kiam vi foriros:

Vi povas lasi vian ŝlosilon sur via lito aŭ skribotablo kaj ŝlosi la dormĉambron antaŭ eliri la apartamenton. Se vi havos tempon kaj volon, vi povos redoni la ŝlosilojn al la deĵoranto ĉe la Studenta Centro (kie vi unue akiris la ŝlosilojn). Almenaŭ informu Ellen se vi lasas la ŝlosilon en la apartamento por ke ŝi informu la konferencan servon. Estas po \$100 monpuno por perditaj ŝlosiloj, do zorgu diligente.

—Ellen

## Kalembura kadro



La lasta enigmo estis **"PARA-FINO"**  
La hodiaŭa estas: S \_ \_ - T \_ \_ \_ O



Unu el multaj Esperanto-kunvenoj en *Dua Vivo*, virtuala mondo interreta. Vido montros ĝin al ni hodiaŭ **je la 3-a en la komuna salono.**

# El la kalendaro:

Bonvolu noti: niaj planoj ŝanĝiĝas ofte. Nur eventoj por *hodiaŭ* estas fiksitaj; la aliaj estas nur provizoraj. La plej freŝa informo haveblas ĉe <http://esperanto.org/nask/kalendaro>

	ĵaŭdo	vendredo	kaj poste...
<b>matene</b>	9-10:20: klasoj 11-12:20: Amri WANDEL (AP&M 4301)	klasoj	
<b>post- tagmeze</b>	2: skajpumado kun TAKE 3: Vido montros al ni <i>Dua Vivo</i> (komuna salono)	<i>Por tiuj, kiuj restos ĉi tie la tutan tagon, eble ni organizos ekskurson al la parko Balboa en San-Diego, kie situas la fama besto-ĝardeno.</i>	<i>Ree al la "unua" vivo... eble ĝis la somero de 2009? :-)</i>
<b>vespere</b>	7: diplomceremonio (AP&M 4301)		



**De maldekstre:** Birke, Alain, Sasha, Neal, Dori, Stelet', Mel, Helen, Jody, Steven, Kristen, Brandon, Lusi, Bertilo, Indu, Esther, Meja, Grant, Mar, Hoss, Koto, Vido, Simmon, Lee.

Soife li stumblis el lito  
kaj, malgraŭ prefera evito,  
strofaron sen tem'  
Li nomis Poem'  
post rima kaj ritma imito.  
—Simono

Alvenis la fino de NASK  
Kaj ies terura hejmtask'  
La Muz' al mi mankas  
La paĝo ja blankas  
Do jen: ĉi tiu fiask'.  
—Steĉjo